# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Januaro: 2 2023

## IRANAJ AŬTORITATULOJ AKCELAS KONDAMNOJN AL PARTOPRENANTOJ EN SURSTRATAJ PROTESTOJ

Laŭ sciigo de reprezentanto de *Internacia Amnestio*, iranaj aŭtoritatuloj postulas morto-punon por 21 homoj, kun la celo timigi eblajn partoprenontojn en la popolaj protestoj, okazantaj en Irano depost la monato septembro.



Jam en la monato novembro Irano informis, ke la revoluciaj tribunaloj de Teherano, irana ĉefurbo, morto-kondamnis al 5 homoj, pro deliktoj pri *malamo al Dio* kaj *koruptado en la tero*. Laŭ la diskonigita juĝo, ĉi tiuj deliktoj realiĝis pere de enurbaj bruligoj, destruktado kaj murdo de policano, okazinta dum surstrataj protestoj. Almenaŭ aliaj 12 homoj, inter ili virino, estas juĝataj pro samaj deliktoj kaj verŝajne ĉiuj ili ricevos saman punon.

Antaŭ kelke da tempo, 227 membroj el la irana parlamento, kun 290 parlamentanoj, postulis al juĝistoj *"ne esti indulgemaj"* al homoj kiuj partoprenas en tiuj protestoj, tiel morto-puno povus utili kiel efika leciono por aliaj homoj. La prezidanto de la juĝista povo, S-ro *Gholamhossein Mohseni-Ejei*, eĉ petis al tribunaloj akceli procesojn, verdiktojn kaj kondamnojn, kaj se temas pri morto-puno, rapidigi la ekzekutojn.

Post la morto de la junulino *Mahsa Amini* fare de policano membro de la departmento pri publika moralo, okazinta la 16-an de septembro, miloj da protestoj okazas sur la stratoj de iranaj urboj. Polico reagis per siaj tutaj fortoj kaj tio provokis mortojn aŭ arestojn de centoj da homoj, inter ili ankaŭ infanoj. Laŭ informoj de la perslingva servo de la brita *BBC* pli ol 15.000 homoj estis jam arestataj, inter ili ne nur partoprenantoj en la protestoj, sed ankaŭ defendantoj de homaj rajtoj kaj ĵurnalistoj. En novembro, irana departmento pri justico informis, ke nur en Teherano 1024 homoj jam estas akuzitaj pri ribelado.

# *Vorto de la Semajno*

## **Ĉantaĝi** (tr)**:**

Devigi iun per skandalminaco pagi monon aŭ doni avantaĝon.

**Ĉantaĝo:** ago de tiu, kiu ĉantaĝas.

**Ĉantaĝisto:** tiu, kiu vivtenas sin per ĉantaĝoj.

Sinonimoj: *minaci, manipuli.*

*Neniam cedu al ĉantaĝoj.*



Lastatempe, estas tre oftaj la klopodoj ĉantaĝi homojn pere de la diskonigado de privataj informoj kaj fotografaĵoj ekzistantaj en iliaj poŝtelefonoj.

## Memoru, ke jam estas tempo rekotizi por la jaro 2023

La jara kotizo de la asocio kostas:

- **7 eŭrojn,** se vi loĝas en iama socialisma lado de Orienta Eŭropo, en Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), en Afriko aŭ en LatinAmeriko.
- **14 eŭrojn**, se vi loĝas en alia lando.

Membro-studentoj pagas neniom.

Eblas pagi al UEA-konto ejax-r, se vi ne havas konton en UEA bv. kontakti kun la asocio por trovi alian manieron pagi la jaran kotizon.
Same, se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. skribi pri tio al nia adreso:

jurista@esperanto.ac